

juna amiko

APRILIO 2009

N-ro 1/2009 (124)

INTERNACIA ESPERANTO-REVUO DE ILEI POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ

Bonvenon Pasko, festo de printempo!

**Tiam en Finnlando
"sorĉistinoj" vizitas
la familiojn.**



Specimena versio kun p. 2-9 kaj 28-39



Vaganto ekripozas
Gracie sola pozas
Li pasive kauras
Trist-bedauras
Rigardas al la foro
Spleno en la koro

Agpreteco tamen bolas
Strechita kiel risorto
Li celen iri volas
Sur la vojo de la sorto

Paŭzo dum pilgrimado

Li vojaĝis jam sep tag-noktojn. For de la hejmo, for de la familio, de la tribo, de varmo kaj for de lia teurura situacio. Tamen, ne sendanĝera estis la vojaĝo. Soifo kaj varmego turmentis lin ĝis li atingis la randon de la dezerto, sovaĝaj bestoj minacis lin dum li trairis la malluman arbaron, kaj nun frosto lin mordas supre en la glaciaj alpoj. Manĝaĵoj tre malabundis; nur malbonaj dormlokoj troveblis. Spite ĉion, la vojaĝon li devis entrepreni – nur unu homo povos diri al li la manieron ripari la malbonon kaj savi siajn tribanojn kaj familianojn. Kiel li povis tiom stulte rompi la kalikon? Kiel li povus scii pri la protekta sorĉo – neniu rakontis tion al li. Kaj ene de semajno malaperis ĉiu akvo el la oazo. Tiu riĉa hejmo, kiu tra generacioj donis ĉion necesan por la vivo al ilia vilaĝo.

Post la katastrofo, liaj gepatroj kaj gefratoj rifuzis paroli kun li. Frostigo duobla, doloro morda. Nur lia avo pretis rakonti pri la maljuna sorĉisto, kiu kiel danko pro helpo ricevita, donacis al la vilaĝanoj tiun kalikon. Tiu maljunulo certe mortis, sed lia filo supozeble fariĝis sorĉisto kaj transprenis ĉiujn sciojn de la patro. La filo-sorĉisto, certe jam maljuna, troviĝas proksime, malantaŭ la sekva monto-pinto.

La junulo movas sin inter la rokoj, delikate lasante minimumajn spurojn. Kaj kvankam proksima al la celo, li haltas, klinante sin suben por paŭzi kaj pripensi la terurajn eventojn de la lastaj tagoj kaj liaj taskoj kaj devoj por la sekva tago.

Post kelkaj minutoj, li levas sin, pluirante; baldaŭ ĉiu spuro de tiu halto forviŝiĝis en la blovata neĝo. La sol-vojaĝanto malaperas, sekvante la mallarĝan vojon al la monto-pinto, kunportante kun si siajn memorojn, bedaŭron, esperojn, timojn kaj kuraĝon...

Imagu kaj mem skribu kio okazos kiam la junulo renkontos la sorĉiston kaj petos helpon.

VORTOJ

pilgrimado: longa vojaĝo por atingi celon
minaco: danĝero
sorĉisto: magiisto
spuro: videbla signo
gracie: elegante
tristo: malĝojo
spleno: melankolio, neklara malbonfarto
risorto: metala spiralo kiu entenas forton
sorto: destino.

Nia oferto!

6 Familioj en fokuso
Skeĉoj, enigmoj, diagramoj

8 Fino de fabelo
Dua parto de nia fabelo

12 LUME: Grandeco en familio
Tomi kaj la gepatroj babilas

16 LUDE: Novaj kapo-rompiloj
Monika Molnar proponas vort-miksaĵojn

20 Ret-babilado...
kaj ĝia freneziga flanko

18 Alveno de nova familiano
Konversaciaj temoj – la kutima ekzamen-
prepara rubriko de Judit Felszeghy

26 La signifo de verdo
Ekologio, paco, espero...

22 Emilo kaj Erni revenis!
Surttere denove, sed en kia loko,
kia tempo? Ĉu ili NASKiĝas?

28 Fabel- kaj desegno-konkursoj
Jam nun akriĝu kraĵojn kaj ekverku!

31 Nova E-muzeo!
Vidu la dorskovrilon!

32 Atestantoj
Skeĉo el Kubo, en kiu
rolas ĉevalo, serpento,
birdo, bovo kaj ĥutio!

34 Sen studi, saĝo ne venas
Mesaĝo de saĝulo el nepala fabelo!

36 Plia Esperanto-klaso salutas!
Ambiciaj planoj el Interkultura Mondo!

38 Bildoj el literaturo
Sud-afrika poeto surpodie

40 Kvizo-ludo
Atendas vian
partoprenemon

41 Aeroplano numero 4
Rimarkinda rakonto pri Ĉinio, kie
numero 4 signifas malfeliĉon kaj
morton. Jen fantomoj kaj timo!



46 Lingva doktoro
Konu la rektaN objektoN!!

47 Popol' ni estas
Poemo: Emeriko Baranyai

48 Fremdlingvaj esprimoj
Du amuzaj anekdotoj el Hindio

49 Verda paĝo
Demandoj kaj respondoj

Nova jaro, nova vesto

Bonvenon al via juna amiko por 2009 kaj al ĝia nova aspekto!

Vi jam povis legi misteran rakonto-fragmenton sur paĝo 3, kun rimarkinda bildo apude. Ankaŭ estonte, tiuj du paĝoj prezentos apartaĵon – mallongan bonvenigilon. Paĝo 4 sumigas nian oferton, kaj ĉi-paĝe ni enkondukas. Ekde paĝo 6 ni provos prezenti facile legablajn erojn de ĝenerala intereso. Tiuj paĝoj en ĉi tiu numero havas apartan temon: 'familio', kiu estas reprenita en la rubrikoj LUME por etuloj kaj LUDE por ne-plu-
etuloj. La cetera revuo celas homojn de ajna aĝo, ĝis inkluzive egulojn. Niaj mezaj paĝoj dediĉiĝas al novtipa prezento de ĉiaj ideoj ligitaj al unu koloro. Taŭĝe, ni komencas la serion per nia propra movada koloro – verdo.

Donu vian opinion pri nia nova koncepto! Ĉu ĝi estas...



bonega



bona



boneta



malbona



katastrofa?

La dua duono de la revuo gastigas niajn pli verdajn rubrikojn: jen lingva doktoro, Interkulturo, historio de Esperanto, verdaj paĝoj... Nur malrekte, tiuj movadaĵoj vivigas la temon 'familio'. Memoru pri la verso de Zamenhof el la himno: *La popoloj faros en konsento, unu grandan rondon familian*. Vi trovos en niaj paĝoj fortan azian emfazon, kun multaj kontribuadoj senditaj de niaj legantoj kaj helpantoj – fabeloj el Vjetnamio kaj Nepalo, anekdotoj el Hindio, rakonto pri Ĉinio, kune kun fabelo el Kubo.

Jen la praktika funkciado de nia 'rondo familia'!

Bonan legadon kaj reagemon!

Stefan_Geza

Ekde nun la du redaktoroj alterne prenos la taskon verki la enkondukon. Kiel ĉiam, ambaŭ subskribas ĝin, sed la substrekita nomo indikas la tiunumeran verkinton.

FAMILIA – FAM' ILIA

Emil: Ekzistas famaj familioj. Fam' ilia estas tutmonda.

Erni: Tio veras. Sed ĉiu havas familion, kaj la plimulto ne estas famaj.

Emil: Ni prezentos al vi la konsiston de tipa familio.

Erni: Sed unue ni prezentu nin mem! Li estas Emil kaj mi estas Erni, vojaĝantaj instruistoj!

Emil: Por nia prezento, ni pretigis du simplajn diagramojn. Rigardu la unuan. Meze staras unu patro kaj unu patrino. Ili havas du infanojn, unu knabon kaj unu knabinon. Ili ambau havas propran patron kaj patrino: do ni havas supre du patrojn kaj du patrinojn. Ili estas la avoj kaj avinoj de la du infanoj. Feliĉe, en ĉi tiu familio, ĉiuj ankoraŭ vivas, eĉ se la geavoj estas maljunaj.

Erni: Emil, ĉu vi ne opinias ke la diagramo estas tro komplika?

komplikaj diagramoj mankas!

Emil: Ne. Aviadil-rega diagramo por flughaveno O'Hare en Ĉikago komence de la Danko-dona ferio estas pli komplika ol tio.

Erni: Sed nur iomete.

Emil: Ne gravas. Ni daŭrigu! La patrinoj kaj la patroj estas ge-edzoj. La geavoj havas filon kaj filinon – ili estas la patro kaj patrino. La geavoj ankaŭ havas nepon kaj nepinon. La nepo estas la filo de iliaj infanoj. La nepino estas la filino de iliaj infanoj.

Erni: Ha! Alvenis aŭskultanto! Bonege. Kiel vi nomiĝas?

Julia: Mi nomiĝas Julia. Mia familio similas al tiu en la diagramo.

Erni: Vere? Kaj ĉu vi komprenas kion diras Emilo?

Julia: Pli malpli.

Erni: Bone, do ni daŭrigu. Knabo havas du avojn – la patron de la patro kaj la patron de la patrino. Knabino same!

Emil: Knabino havas du avinojn – la patrino de la patro kaj la patrino de la paĉjo. Knabino same!

Erni: Avino povas havi nepinojn. Ili estas la filinoj de la propraj infanoj. Avo same!

Emil: Avo povas havi nepojn. Ili estas la filoj de la propraj infanoj. Por avino, validas same!

Erni: Geavoj ofte havas multajn genepojn. Geavoj ofte donas al genepoj belajn donacojn. Ili ĝojas. Geavoj ofte prizorgas nepojn, kiam iliaj gepatroj volas ricevi liberan vesperon. Ili ĝojas. En bonŝancaj kazoj, ĉiu ĝojas.

Julia: Ankaŭ en mia familio, ni havas grandan aron da nepoj.

Erni: Amuze! En tiu kazo, la rezulto ĉiam estas... nepara!

Emil: Erni – ĉesu fari tiajn malbonajn ŝercojn. Ni rigardu la duan diagramon. Ĉi-foje ni havas du patrojn, kaj ili estas fratoj.

Erni: Emil, Julia, ĉu vi ne opinias ke la diagramo estas tro komplika?

Julia: Ne. Mi havas robo-kudran planon, kiu estas pli komplika ol tio.

Erni: Verŝajne nur iomete.

Emil: Do, ni daŭrigu! La filoj de la gefratoj de patro aŭ patrino estas nevo. La filinoj de la gefratoj de la patro aŭ patrino estas nevinoj.

Erni: Se multaj kuzoj iras al konferenco, kia estas la rezulto?



Julia: Ankaŭ en mia familio, ni havas multajn nevojn kaj kuzojn.
Erni: Se multaj kuzoj iras al konferenco, kia estas la rezulto?
Emil: Ho, plia terura ŝerco de Erni. Mi ne scias, kia estas la rezulto?
Erni: Konfuzo!
Emil: Grrrr. Mi provas prezenti ĉi tie seriozan lecionon!
Erni: Mi ne malhelpas tion. Cetere, ĉu vi povas diri al mi, kial oni neniam ataku nevon per tranĉilo?
Emil: Nu, oni ataku neniun per tranĉilo! Kial aparte ne nevo?
Erni: Ĉar la rezulto estas... nevera.
Julia kaj Emilio: Grrrrrr!



Sufiĉe da instruado. Poste en la revuo vi trovos du skeĉojn pri familioj. Aktoru ilin! Kaj kompreneble, Emil kaj mi reaperas poste en nia kutima bildstrio. Ĝuu ĉion!

LA REVENO DE LA ORA POMO

(parto du)

En nia antaŭa numero, ekde paĝo 11, ni aperigis la unuan parton de la fabelo kiu gajnis la konkurson de 2008. Temas pri kuniklo Fifi, kiu perdis oran pomon dum Fifi kaj amikoj Keti kaj Bruno naĝis en lago. Fiŝo elsaltis kaj informis ilin, ke urso forprenis ĝin. Ili trovis la urson kaj ĝi konsentis redoni la pomon se ĝi ricevos ion alian oran interŝanĝe. Do, la amikoj reiris al la lago. Nun, legu plue!

Post kelkaj minutoj, aperis la fiŝo. Ĝi rekonis la tri amikojn. "Saluton!" ĝi diris: "Ĉu vi sukcesis ricevi vian oran pomon?"

"Ne, ankoraŭ ne! Sed povus okazi! Ĉu vi ne dezirus loĝi en bela akvario? Kun pura akvo kaj regula nutrado!"

"Hmmm. Mia lago ja estas malpura, kaj mi malfacile trovas manĝaĵojn. Sed krome, kaj ĉefe, en la lago mi nun estas sola. Ĉiuj el

miaj amikoj fornaĝis aliloken. Mi ne volas esti sola en eta akvario, eĉ kun multaj manĝaĵoj, ne."

"Tie vi ne estos sola. Vi havos amikojn! Bonajn amikojn!" diris Fifi.

"Eĉ du amikojn", aldonis Bruno: "Du bonajn amikojn!".

"Estas unu arĝenta fiŝo...", diris Keti.

"...kaj unu bronz-kolora fiŝo", finis Fifi.

"Hmmm. Agrable", diris la fiŝo: "Kaj, neniu ora fiŝo tie?"

"Neniu. Vi estos la sola.

Vi estos la ĉampiono. Ĉu vi konsentas transloĝiĝi?"

"Ĉu la mastro de la akvario estos bonkora kaj zorgema?"

"Ho, jes," respondis Keti:

"li kelkfoje diris, ke li tre ŝatas fiŝojn."

"Do, mi konsentas."

"Bonege. Do, mi plenigos ĉi tiun platan sakon per akvo kaj vi ensaltu."



Post duonhoro la ora fiŝo vere eniris la akvarion kaj sin prezentis al la du aliaj fiŝoj. Ili ĝoje ĉirkaŭnaĝis.

La kuniklo ricevis siajn kontraŭsunajn okulvitrojn kaj la oran pomon. Kontentaj, la tri amikoj iris hejmen. Ĝoja Fifi montis la oran pomon al la Panjo kaj rakontis ĉion.

La tri amikoj vivis feliĉe kune dum multaj postaj jaroj.

Vortklarigoj

akvario: fiŝujo
nutrado: manĝigado
arĝenta, bronza, ora:
 metalaj koloroj; tiuj de
 olimpikaj medaloj.
ĉampiono: heroo, gajninto
konsenti: diri 'jes'.
mastro: prizorganto.

Kaj ĉu la ora fiŝo? Ni ne scias. Eble ekestis multaj belaj or-koloraj fiŝetoj.

Aŭ eble io alia.

Estas konate, ke ursoj ŝatas fiŝojn.

Sonja MacGill, Hungario



Invito al



Tutmonda Fabelkonkurso 2009 en Esperanto

Ĉu vi aĝas malpli ol 14 jarojn?

Se via respondo estas jesa, jen estas la okazo partopreni en ĝi!

Kultura-literatura centro en Taivalkoski, Norda Finnlando, portas la nomon de *Kalle Päätalo* (1919-2000), eminenta finna verkisto, naskiĝinta en Taivalkoski. En la jaro 1993 li iniciatis tut-landan fabelkonkurson por finnaj infanoj, kiu estas nuntempe la plej prestiĝa konkurso en Finnlando.

En la jaro 2000 la instituto aldonis al la konkurso Esperanton. En ĉi tiu jaro ĝi okazos, do, jam la **dekan fojon**.

Kategorioj:

A) por infanoj ĝis **8-jaraj**, **B) 9-10-jaraj** kaj **C) 11-13-jaraj**.

Rimarko. La konkursaĵoj devas esti verkitaj originale en Esperanto de individuoj aŭ grupoj (ekz. de lernejoj klasoj). Individuaj kaj grupaj konkursaĵoj estos taksataj aparte.

La ĵurio aprezas precipe fabelecon kaj originalecon. La verko estu mallonga (1-5 folioj), ligita al la infana mondo, karakterizita de sorĉeco, mistero kaj supernaturaj okazaĵoj, kiuj kreas etoson fascinantan por infanoj. Rakonto kun temo el la reala mondo, eĉ se lerte verkita, ne estas konsiderata kiel fabelo.

Sendu la konkursaĵon poŝte ĝis la **15a de septembro 2009** al:

**Päätalo-Instituto, Fabelkonkurso, PL 39,
FI-93401 Taivalkoski, Finnlando**

Uzu kaŝ-nomon kaj menciu, ĉu temas pri grupo aŭ unuopulo. La nomo, adreso, naskiĝ-dato kaj (se eblas) telefonnumero aŭ ret-adreso de la konkursanto troviĝu en aparta fermita koverto.

Pli da informoj donas la komisiito pri la konkurso:

S-ino Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando (rete: aini.esp@pp.inet.fi)

Fabeloj, premiitaj en antaŭaj jaroj, estas legeblaj en:

<http://www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/esperanto.htm>

La rezultojn oni publikigos sam-tempe kun tiuj de la finna konkurso, la 18an de oktobro, kiam finnoj festas la tagon de Satu (finna vorto por fabelo). En ĉiu kategorio estas principe tri premioj. Unu el la gajnintoj de la unua premio ricevos ankaŭ la ĉef-premion *Fabelo Internacia*.

Por fari al vi apetiton partopreni en la Tutmonda Fabelkonkurso,

ni publikigas du mallongajn fabelojn, kiuj ankaŭ estis premiitaj pasintjare.

Ĉu vi povus verki ion similan?

LA PLEJ BONA HORLOĜO

Ĉe iu horloĝisto vivis horloĝoj. La unua - elektronika, la dua - kun pendolo, la tria - kun romaj ciferoj sur sia vizaĝo, la kvara - kiu revas pri cifero dek tri, kaj la kvina, kiu volas esti ora, sed estas nur arĝenta.

Iam la elektronika horloĝo komencis paroli, ke plej bonaj estas elektronikaj horloĝoj.

- Ne - aldonis tiu kun pendolo - tiuj kun pendoloj estas elstaraj!
- Kaj mi pensas, ke plej bonaj estas tiuj kun kukolo! - diris tiu, kiu revas pri cifero dek tri.

Neatendite alvenis horloĝisto kun kliento, kiu volis riparigi sian brak-horloĝon.

- Jen estas la plej bona horloĝo - diris la horloĝisto kaj ŝanĝis baterion en la brakhorloĝo.

Nikolas Mikolajewski, Pollando

(Ĝi gajnis la trian lokon en la kategorio B, 2008)

STULTA MUSETO

Vivis-vivadis museto. Foje li vetis kun siaj amikoj. Li asertis, ke li sukcesos kapti la katon. Sekvan tagon li diris, ke li sukcesos formanĝi ĝin. Postsekvan tagon li diris, ke li sukcesos kur-atingi ĝin.

Li fanfaronis tiel laŭte, ke li ne rimarkis, ke la kato ŝtel-proksimiĝis, kaptis kaj formanĝis lin.


Tiel ĉesis vivi la fanfaronulo.

Polina Matvejeva, Rusio
(La fabelo gajnis la trian lokon en la kategorio A, 2008)

*kliento: aĉetanto, mendanto /
pendolo: supre fiksita pendajo, kiu
malsupre iras tien kaj reen.*

*stulta: malsaĝa / fanfaroni: diri
ĉiam ke „mi estas la plej lerta“*





Ĉeĥa Esperanto-Asocio startigas konkurson de infanaj artaĵoj kun la temo FERVOJO, kies celo estas omaĝi al centjariĝo de la organizita Esperanto-movado inter fervojistoj, en kiu ankaŭ ĉeĥaj esperantistoj ludis gravan rolon.

La kondiĉoj por la konkursaĵoj:

Partopreni rajtas ĉiuj infanoj ĝis **15** jaroj inkluzive (laŭ la atingita aĝo en 2009), kiuj parolas aŭ lernas Esperanton.

Estas du aĝkategorioj, **kategorio A** ĝis 10 jaroj inkluzive, kaj **kategorio B** ekde 11 ĝis 15 jaroj. Oni akceptas ajnan artaĵon surpaperan (aŭ sur ali-materiala folio) en la grandeco maksimume A4 (210 x 297 mm): desegnaĵojn, poemojn, rakontojn, fotografiaĵojn aŭ ajnajn kombinaĵojn de ili. Ĉiu aŭtoro povas sendi maksimume tri konkursaĵojn.

La aliĝilo kun detala regularo estas trovebla ĉe www.esperanto.cz/infankonkurso, sed oni povas ĝin peti ankaŭ ĉe *Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, CZ-26802 Svitavy, rete; dvor.libuse@seznam.cz*

Estos konsiderataj nur la artaĵoj, kiuj estos akompanataj de la aliĝilo, respegulos la regularon de la konkurso kaj ĝis la 31-a de aŭgusto 2009 atingos la adreson:

Esperanto-muzeo Blanka Čuhelová, Máchova alej 1, CZ-56802 Svitavy.

La elektitaj konkursaĵoj estos ekspoziciitaj en Esperanto-muzeo Svitavy ekde aŭtuno 2009 dum ses monatoj en la planata ekspozicio pri centjariĝo de internacia Esperanto-movado inter fervojistoj. Kaze de intereso la ekspozicio estos pruntedonita ankaŭ al aliaj urboj, eĉ eksterlanden.

Minimуме tri aprezitaj aŭtoroj ricevos premion kaj estos invitatitaj al la inaŭguro de la ekspozicio.

Petro Chrdle

Esperanto-muzeo en Svitavy, Ĉeĥio

Certe neniu el la legantoj de Juna Amiko dubas pri tio, ke muzeoj estas tre gravaj instalaĵoj, kaj multaj verŝajne scias pri la plej konata, kaj plej riĉa Esperanto-muzeo, kiu troviĝas en Vieno.

Sed ĝi ne estas la sola muzeo, kiu okupiĝas pri Esperanto. La plej nova inter ili, tre verŝajne, estas tiu en Ĉeĥio, en la distrikta urbo Svitavy. La tiea Esperanto-muzeo estis inaŭgurita en septembro 2008 kaj la unua ekspozicio prezentis ĝeneralajn informojn pri la internacia lingvo Esperanto, pri ĝia ekesto, evoluo, historio. La dua ekspozicio, kies inaŭguro estis la 28-a de marto, nomiĝas *Esperanto kaj junularo* kaj havas du partojn: la unua omaĝas la kvardekjariĝon de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj la dua, kiu donis nomon al la tuta ekspozicio, prezentos la evoluon de junulara Esperanto-movado en Ĉeĥio kaj en la mondo kaj fokusiĝos precipe al la TEJO-kongreso, kiu okazos ĉi-jare en ĉeĥa urbo Liberec.

Kaj la sekvanta ekspozicio, inaŭgurata aŭtune, havos denove du partojn, la unua estos dediĉita al 100 jaroj de Esperanto-movado inter fervojistoj kaj la dua al Esperanto kaj infanoj. Estos eksponitaj verkoj de la arta infankonkurso, pri kiu vi povas legi ĉi-apude. Do povas esti, ke ankaŭ via artaĵo estos inter ili. Estos ja bona ŝanco, do pripensu.



Foto: PETRO CHRDLÉ

ATESTANTOJ

Skeĉo por infanoj



Roluloj: Birdo

Serpento

Ĥutio

Ĉevalo

Bovo



Serpento (*Aŭdiĝas kriego, sed oni ne vidas, kiu kriegas*): Helpu! Helpu min!

Ĥutio (*provas trovi, de kie venas la helpo-krioj kaj rigardas malsupren*): Ah! Estas vi, serpento! Kion vi faras tie?

Serpento: Mi falis en ĉi tiun kaptilon. Ne demandu tro, prefere helpu min!

Ĥutio (*komencas eltiri la serpenton*): Ek! Iom pli, kaj jam jen!

Serpento (*kun intenco volvi sin ĉirkaŭ la kolo de la ĥutio*): Fine! Kaj mi malsatas, ĉar mi estis tro longe en la kaptilo. Pro tio mi nun manĝos vin.

Ĥutio: Ĉu per tio vi pagas mian bon-faron?

Serpento: Nu jes, bonfaro rekompenciĝas per sia malo...

Ĥutio: Atentu! Vi eraras. Kaj mi konvinkos vin. Ni serĉu tri atestantojn, kaj vi jam vidos, ke vi malpravas.

Serpento: Kiom da atestantoj?

Ĥutio: Tri sufiĉas. Rigardu! Jen la ĉevalo. Ni komencu per ĝi.

Serpento: Demandu al ĝi.

Ĥutio: He, ĉevalo! Mi savis la serpenton kaj nun ĝi volas manĝi min. Ĉu vi opinias, ke estas ĝuste pagi bonfaron per malbonfaro?

Ĉevalo: Jes ja. Rigardu min. Kiam mi estis juna, mi helpis mian mastron, sed nun, ĉar mi estas ĉevalaĉo, li eĉ ne rigardas min. Mia mastro pagas al mi bonfarojn per malbonfaro.

Serpento: Hahaha, ĥutio, mi jam havas atestanton.

Ĥutio: Jes, ĉar la mastro de la ĉevalo estas maldankema kaj fia kiel vi.

Serpento: Ne estu stulta kaj demandu la bovon, kiu proksimiĝas.

Ĥutio: He, bovo! Mi eltiris la serpenton el la kaptilo, kaj nun ĝi volas manĝi min. Ĉu vi opinias tion justa, ke bonfaron oni repagu per malbonfaro?

Bovo: Jes ja. Mi laboris kaj laboradis, kaj nun mia mastro ne plu interesiĝas pri mi. Li repagas bonfarojn per malbonfaro.

Serpento: Hahaha, ĥutio, mi havas jam du atestantojn.

Ĥutio: Ĉar la mastro de la bovo estas tiel fia kiel vi. Sed mi ne estas venkita. Ankoraŭ mankas unu.

Serpento: Demandu al tiu birdo, kiu tie flugas de branĉo al branĉo.

Ĥutio: He, birdeto, mi savis la serpenton kaj nun ĝi volas manĝi min. Ĉu vi opinias, ke tio estas justa?

Birdo: Do, por decidi, mi devas scii kiel ĉio okazis. Kunportu min al la kaptilo.


Serpento: Jes, jes, ni iru tien. Mi havas jam du atestantojn. (*Turnante sin al la ĥutio*) Vidu, mi venkos kaj manĝos vin.

Ĥutio: Jen ĉi tie.

Birdo: Serpento, montru al mi, kie vi troviĝis, kiam la ĥutio savis vin.

Serpento (*ĵetinte sin en la kaptilon*): Mi estis ĉi tie, etulo. Jam ni finu la aferon.

Birdo: Do, vi restu tie, por ke lernu esti dankema. Kaj por ke vi ne ripetu denove, ke oni pagu bonfaron per malbonfaro.



Elhispanigita de *Jozefo de Jesús Campos Pacheco*, Kubo

atesti: helpi juĝiston per tio, ke iu eldiras, ke ĉeestante kion li/ŝi/ĝi vidis, aŭdis aŭ spertis / *skeĉo*: mallonga sceno, teatraĵeto / *stulta*: malsaĝa

SEN STUDI SAĜO NE VENAS

Antaŭ multaj jaroj vivis saĝulo nomata Vardaĵ. Li havis filon. Lia nomo estis Javkrit. Ankaŭ li volis saĝuliĝi. Por saĝiĝi necesas edukado kaj studado. Sed li volis iĝi saĝulo sen studado.

En iu tago li demandis al si: „Kiel saĝiĝi sen studi?” Kaj li tuj trovis respondon: „Mi iros al la bordo de la rivero kaj sidante, meditante mi akiros edukon. Eduko kreskigos saĝon kaj kun saĝo mi fariĝos saĝulo.” Ne atentante pri la konsilo de la patro li foriris al la river-bordo kaj komencis mediti sidante kun kruroj krucigitaj. Li faris grandan meditado. Li ne timis ŝtormon, pluvegon, hajlon, ktp. Li daŭrigis la meditado.

La reĝo de la dioj loĝas en la ĉielo. Dum Javkrit meditis, li aperis apude sur la tero kaj diris: „Ekstaru, kara, kaj malfermu la okulojn!”

Li malfermis la okulojn, ekstaris kaj surpriziĝis vidante apud si la dion de la ĉielo – Indra. Li salutis lin kaj diris: „Kara dio! Mi tre ĝojas vin vidi. Jen plenumiĝis mia deziro.” Indra karesis al li la kapon kaj afable demandis: „Diru, kara, kio estas via deziro? Kial vi meditadis tiom multe?” Preĝante li respondis: „Dio mia! Sen studado, per la forto de meditado mi povos ellerni tutajn Vedojn. Sen ajna laboro mi povu akiri tutan mian saĝon.”

Aŭskultante Javkriton Indra ridis kaj diris: „Kara Javkrit, via deziro estas stranga. Sen studi, kiu povas saĝuliĝi? Vi devas studi por trovi saĝon

kaj saĝuliĝi. Legu Vedojn hejme kun via patro, la saĝulo. Edukado ne ekzistas sen instruisto. Elektu kiel instruiston vian patron aŭ aliajn.

Javkrit diris: „Kara, studado bezonas longan tempon. Mi ne volas perdi tiom da tempo. Mi tuj volas saĝuliĝi.”

Indra konsilis al li dirante: „Kara, forĵetu tian obstinon. Sen laboro, sen studado saĝo ne eblas.”

Al Javkrit ne plaĉis la ideo de la dio. Li diris al la dio: „Bonvolu foriri. Al mi ne plaĉas via ideo kaj konsilo. Mi volas akiri saĝon sen studi, helpe de meditado.”



Javkrit daŭrigis la meditado. Kun malĝojo Indra foriris kaj alvenis en la ĉielo. Li pensis: „Kia-maniere stulta

knabo kiel Javkrit povas esti kondukita sur ĝustan vojon?” Estis lia devo fari ion por tia stulta homo. Baldaŭ venis al li bona ideo, kaj li reiris al Javkrit. Sed ĉi-foje li estis maskita kaj vestita kiel Brahmin. Li komencis ĵetadi sablon en la akvon de la rivero. La fluo de la rivero forportis la ĵetitan sablon. De tago al tago li faris tion antaŭ la meditante knabo. Javkrit vidis ĉion kaj trovis lian agadon tre stranga. Finfine li ekstaris, iris al Brahmin kaj demandis: „Sinjoro, kial vi faras tion?” Brahmin respondis: „Ĉu vi ne vidas? Mi volas fari baraĵon ĉi tie.” Aŭdinte la respon-

de viaj manoj?”

Brahmin respondis kolera: „Vi volas akiri saĝon sen studi. Se tio eblas, kial mia volo ne eblas?”

Javkrit ne respondis. Li foriris de Brahmin, kiu daŭrigis sian laboron. Javkrit pensis pri sia provo kaj decidis ne plu mediti. Li iris hejmen, bedaŭris pri sia ideo kaj komencis studi Vedojn kun sia patro.

Cholnath Pokhrel, Nepalo

hajlo: glaciiginta pluvo / obstina: malcedema / stulta: malsaĝa / surprizi: fari, diri ion neatenditan / ŝtormo: pluvego kun ventego / Vedoĵ: sanktaj libroj de hinduismo

Ŝercaj demandoj

1. Kiu parolas ĉiujn lingvojn?
2. Kiam estas plej bone manĝi malgrandajn fiŝojn?
3. Kien neniam lumas la suno?
4. Kiu monato estas la plej mallonga?
5. Kial kokerikas koko?
6. Kio estas la plej bezonata ĉe manĝado?
7. Kiun vestaĵon preferas puloj?

Dieter Berndt

(Solvaj sur paĝo 41)

HUMURO

de Saliko

Du bubaĉoj enbusiĝas. Unu krias al la ŝoforo:

“He, Noa! Ĉu la arkeo ankoraŭ ne plenas?”

“Ne. Bonvolu enveni. Estas loko por du azenoj.”



InterKultura Mondo

www.interkulturo.net

Rubrikestro: *Elena Nadikova*, Rusio

lena_espero@mail.ru

Okaze de la veninta jaro 2009 la plej korajn bondezirojn deziras al vi la tuta *Interkultura Mondo* kaj ĝia gvidanto *Elena Nadikova*!

En kelkaj antaŭaj numeroj ni rakontis al vi pri la projektoj de la programo “Socrates/Comenius”. Hodiaŭ ni daŭrigos la temon kaj prezentos al vi la bazlernejon „Komlóstetói” (Komlooštetei) el urbo Miskolc, Hungario.

La bazlernejo „Komlóstetói” kun gelernantoj 6 ĝis 14-jaraj estas la plej juna lernejo de Miskolc, tamen en ĝi jam pli ol dudek jarojn okazas Esperanto-instruado en fakrondo. Ĉiu-jare almenaŭ unu klaso elektas nian lingvon. La esperanto-lecionojn gvidas diplomita pedagogo, arda adepto de la Internacia Lingvo, sinjorino *Ilona Fedor*, kiu instruas Esperanton jam pli ol dudek jarojn. En tiu ĉi lernojaro tri klasoj (2a, 3a kaj 6a) okupiĝas pri Esperanto. Ĉiu-semajne ili renkontiĝas du-foje post la devigaj lecionoj. En la pasinta jaro la lernejo gajnis Comenius-projekton. Partneroj fariĝis angla elementa lernejo el Bar Hill kaj germana bazlernejo el Herzberg. La projekto temas ĝuste pri la rolo de Esperanto en la komunikado kaj lingvolernado.

Etaj hungaraj esperantistoj estas tre entuziasmaj kaj lernas la lingvon kun granda ĝojo. Tre plaĉas al ili, ke ĝi estas simpla, kaj ke ili povas paroli kun alilandaj infanoj ĉi-lingve. Ili uzas diversajn lernilojn. Nun, ekzemple, la lernomaterialon de “Springboard”, kiun ili ricevis de la anglaj partneroj. Ĉi tiuj taskofolioj kaj le-



cionoj estas tre interesaj kaj tre plaĉas al la hungaraj geknaboj. En la lecionoj estas kantoj kaj ludoj. Do, ili multe kantas. (Ja la lingvo de muziko ankaŭ estas internacia!) Krom tio geknaboj ludas teatraĵetojn, kompreneble esperantlingve; uzas ankaŭ la filmon „Mazi en Gondolando”. Ili ludas ĉiujn scenojn kaj tiele tre ĝuas la lingvolernadon. Cetere, la infanoj korespondas kaj krom tio interparoladas, kiam ili havas komunajn lecionojn tra Skajpo en interreto. Pri tio ni volas rakonti pli detale. Ĉiu-monate almenaŭ unufoje en la lernejo “Komlóstetói” okazas komuna leciono kun la angla klaso. Tio signifas, ke en la sama tempo okazas la lecionoj en Miskolc kaj en Bar Hill. La infanoj povas vidi unu la alian kaj babili. Tiuj ĉi komunaj lecionoj ĉiam ege ĝojigas ĉiujn infanojn.



Krom tio, la tri partner-lernejoj havas komunan retpaĝaron, kie oni povas rigardi la desegnaĵojn kaj aliajn laboraĵojn de la gelernantoj, aŭ videofilmojn pri la kantoj kaj scenoj. Kaj, certe, la plej interesa parto de la projekto estos, kiam ĉiuj partneroj renkontos unu la alian trifoje. Unue la hungaraj kaj germanaj lernantoj vizitos la anglan lernejon en Bar Hill la 24-an de aprilo 2009. Poste en oktobro de la nuna jaro la germana kaj angla partnerlernejoj vizitos Hungarion. Kaj fine, en marto 2010 okazos la lasta vizito al Herzberg. Dum la vizitoj ĉiuj tri lernejoj estos kune kaj prezentos diversajn interesajn programojn. Kaj la infanoj uzos la lingvon kaj povos reciproke ekkoni la kutimojn de la aliaj popoloj.

Ĉu tio ne estas bonega *interkultura sperto*? Certe, jes! Kaj ni, post etaj hungaraj esperantistoj, volas ripeti: “*Ni salutas ĉiujn infanojn en la mondo kaj proponas lerni Esperanton! Esperanto estas tre bela kaj bona lingvo, ni tre ŝatas ĝin. Lernu ankaŭ vi Esperanton kaj ni estos geamikoj!*” (Vi povas vidi la saluton de hungaraj lernantoj en la fotoj.) Nia rubriko esprimas koran dankon al *s-ino Ilona Fedor* pro la sendita materialo.

En tiu ĉi rubriko vi trovas bildojn el la Esperanta literatura heredaĵo dank' al la plumo de nia fidela amiko, elstara islanda poeto, Baldur RAGNARSSON. Konsciĉu, ke sen bazaj scioj pri nia historio kaj literaturo oni ne povas fariĝi cel-konscia esperantisto, sukcesa pledanto por nia nobla ideo. (Red.)

26 **EDWIN DE KOCK**

En 2007 aperis nova poemplibro, *Sub fremdaj ĉieloj*, de Edwin de Kock, la deka ekde lia unua poemaro *Ombroj de la kvara dimensio* (1961) pri kiu mi skribis sen ajna hezito en la tiama revuo *Norda Prismo*: "Per ĉi tiu libro Edwin de Kock ne-kontesteble pravas, ke li jam apartenas al la frontvico de la mal-

granda taĉmento de seriozaj Esperanto-verkistoj." Edwin kaj mi estas samaĝanoj, naskitaj en 1930, kaj jam antaŭ la aperigo de tiu lia unua libro ni estis leteramikoj, ambaŭ junaj kaj poete ambiciaj. La cititaj vortoj, skribitaj en flagranta entuziasmo pri la verko de mia amiko, pruviĝis daŭre kaj plene veraj: Edwin de Kock jam antaŭ longe certigis al si lokon kiel unu el la plej originalaj kaj fekundaj poetoj en Esperanto.

Edwin de Kock estis Sudafricano ĝis sia transloĝiĝo al Usono antaŭ 15 jaroj. En Sudafriko li laboris kiel procento pri la angla kaj afrikansa lingvoj. Li lernis Esperanton en 1955 kaj jam tiam komencis verki poemojn en la internacia lingvo. Li estis redaktoro de sudafrikaj Esperanto-revuoj kaj kontribuis al tiama internaciaj literaturrevuoj *Norda Prismo* kaj *La nica literatura revuo*.

Mi jam menciis poetan ambicion. Ambicio ĉe poeto estas bona afero, se ne temas pri ambicio de konkurado

kun aliaj, sed pri persona, sana ambicio bazita sur propraj potencialoj kaj konvinkoj. Jam en sia unua poemplibro riviĝas la poeta ambicio de Edwin de Kock, tie svarmas ideoj kaj originalaj bildoj, kaj evidentas lia aspiro serĉi kaj trovi vojon al kreo de granda poezio. Tio ekzemple estas konstatabla en poemo titolita *Kristaliĝo*:

*Akvo de la vivparolo
en la klara lumo bruas,
pro la ĝojo, tristo, folo;
kaj la riverego fluas
al la maro de silento.
Sed kaptite inter rokoj,
al la kuro de l' torento
kaj la plaŭdmortantaj voko,
vortoguto malleviĝas
korkavernen kiel semo –
kreske post la jaroj iĝas
stalaktito de l' poemo.*

Tiu ambicia celo de Edwin de Kock evoluis tra la sekvaj poemaroj, *Fajro sur mia lango* (1967) kaj *Kvin elementoj* (1970), kaj kulminis en la vaste konceptita, sed ankoraŭ nefinita eposo *La konflikto de la epokoj* (Libro 1, 1984, Libro 2, 1985). Tie religio havas gravan funkcion en intima ligo kun la emocia naturo de la poeto mem. Libro 1 priskribas sciencfikcian vojaĝon de la poeto tra la tempo en akompano kun Lucifero, meditadon pri Dio kaj la

homoj, kiuj konas lin intime kaj havas multon interesan por diri pri tiu eksterordinara homo. Efektive la libro estas unika en Esperanto en tiu senco, ke ĝi enhavas kvazaŭ "testamenton" de poeto, kiu prave opinias, ke por plena kompreno de lia originala verkaro necesas raporti laŭeble komplete pri lia vivo, liaj cirkonstancoj, liaj konfliktoj, liaj kredoj, liaj konvinkoj. La poemoj estas plej multaj verkitaj ekde 1995 post la transloĝiĝo de la poeto al Usono. La

BILDOJ EL LA HISTORIO

LITERATURO DE LA ESPERANTA

diablo kaj pri la konceptoj de boneco kaj malboneco. Libro 2 prezentas la filozofion de la poeto en ligo kun okazoj en Palestino en la tempo de la Biblio. Entute tiuj du unuaj libroj de la eposo ampleksas pli ol tri mil versojn. Plenumo de la impona plano de la poeto pri tri pliaj libroj ankoraŭ atendas publikigon.

Pliaj poemaroj de Edwin de Kock estas certe menciindaj: *Plukonstrue* (1975), *Japaneskoj* (1982), *Saluton al la suno* (1983) kaj *Vojaĝoj kaj aliaj poemoj* (1992). Lia lasta, *Sub fremdaj ĉieloj*, havas apartan rolon en la verkaro de Edwin. Ĝi ne nur enhavas sufiĉe grandan faskon da poemoj – entute 51 – sed ankaŭ kvin prozajn verkojn sub la komuna titolo *Pri kaj ĉirkaŭ Edwin de Kock*. Tiuj prozaj verkoj enhavas membiografiajn tekstojn de la poeto mem kaj verkaĵojn de

temoj de la poemoj estas variaj: de dolora indigno kontraŭ mistraktoj kaj kruelaĵoj de homoj al homoj – kie elstaras "Rekviemo por la Albigenoj", dolora meditado pri la krucmilito de la Papo kaj la franca reĝo kontraŭ la herezaj Albigenoj en suda Francujo 1209-1229 –, ĝis nostalgio de la poeto por sia antaŭa hejmlando, kiel ekzemple en tiu ĉi tankao:

*En la momenton
saltas dista memoro.
Ne, ne, oldulo!
Forpasis tute tiuj
korlando, homoj, horo.*

Venontjare Edwin de Kock festos sian okdekjariĝon. Kvankam ni eble havas lian poetan "testamenton" en lia lasta libro, ni povas fidi, ke li plue havas multon valoran por diri al la legantoj de siaj poemoj.